


DIA REGNO

ISSN 0167-9554

DIA REGNO

✪ dumonata kristana revuo en esperanto ✪ n-ro 1 (844) 2004 ✪



SOLA GRATIA

la nova kongresejo

KONGRESO — EKLEZIO

KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala, kunlaboranta
kun UEA

Celo: Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj
landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri
Jesuo Kristo.

Prezidanto: Jacques TUINDER

✉ Henegouwenlaan 35, NL 1966 RH Heemskeerik
☎+31 251 231941;
✉ d.tuinder-dekker@wolmail.nl

Sekretario: Els VAN DIJK-KUPERUS

✉ Koningsmantel 4, NL 2403 HZ Alphen a/d Rijn,
Nederlando; ☎+31 1724 20222;
✉ j.a.van.dijk@hetnet.nl

Kasisto: Siegfried KRÜGER

✉ Dinkelsbühler Str. 12, DE 74074
Heilbronn, Germanio; ☎+49 7131 162688;
✉ SLKrueger@gmx.de

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume
€ 20,- ☎ Membro-subtenanto € 30,- ☎ Nura
abono: pagante rekte al KELI € 16,- ☎ pagante al
Libroservo € 18,- Sendoj de okcidentaj monbiletoj
per registrita letero al la kasisto de KELI ☎ Se
estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu
ĉe UEA) bonvolu preferi pagi al UEA por konto
kelk-p de KELI ☎ Nederlanda poŝtĝirkonto de
KELI: 5506132.

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo — ISSN 0167-9554

Redaktoro: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Venet, FR 86340
Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☎+33 (0)5 49 46 80 21;
✉ diaregno@altern.com.

Abonprezo sen membreco en KELI: € 16,- aŭ
egalvaloro. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la
kasisto de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la
aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe,
ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ
traduko oni sendu al la Redaktoro.*

**Enpaĝigo, grafika prilaboro, presado
kaj ekspedado:**

Eldonejo HEJME Kazimierz LEJA
✉ pf. 59, PL 41-250 Czeladź, Pollando
☎+48 32 2650038; ✉ esperanto@hejme.e-tools.pl

Enhavtabelo

- 3 Personaj impresoj de Arne LUNDKVIST pri la
16a Ekumena Esperanto-Kongreso
- 4 Raportado pri la kongreso
- 8 „Vi estos miaj atestantoj”
- 10 Prediko de Jacques TUINDER
- 12 Benoj por beni aliajn
- 12 Alvenu kun kuraĝo
- 13 Kial ne alporti brikon por Domo de Paco en
Kaŝmiro?
- 14 „Urbi et Orbi kaj Esperanto”
- 15 Miraklo kun la pordo de ĉelo en malliberejo
en Nagalando (Hindio)
- 16 Filipianoj 2:5–8
- 17 Jekaterinburgo: Caraj tagoj
- 20 Unua listo de aliĝintoj al la KELI-Kongreso
- 22–23 Niaj karaj Forpasintoj...
- 24 La centa Psalmoj
— kaj inter ili kutimaj eroj...

Redaktoraĵoj

Karaj gelegantoj,

Unue mi volas transdoni al vi miajn plej
korajn bondezirojn por la nova jaro. Ni ĉiuj
estas en la manoj de nia Sinjoro, kaj li certe
gvidas nin. Ankaŭ nian agadon.

Kun la antaŭaj numeroj de la revuo, vi
ricevis la aliĝilon por la ĉijara kongreso
en Ĉeĥio. Kelkaj jam aliĝis. Ĉu eblas, ke vi
ankoraŭ tion ne faris? Mi proponas al vi bil-
don de la kongresejo, en moravia montara
regiono. Pliajn vi trovos en la ttt-ejo de KE-
LI (www.chez.com/keli). Ankaŭ la aliĝilon se
vi bezonas pliajn.

En la nuna numero enestas kelkaj rapor-
toj pri la pasintjara kongreso, kun bildoj.

Ankaŭ kelkaj reagoj al la revuo. Pliajn le-
terojn mi atendas, esperas.

Denove, Bonan Jaron al ĉiuj. Dio be-
nu vin.

Philippe COUSSON

Personaj impresoj de Arne LUNDKVIST (SE) pri la 16a Ekumena Esperanto Kongreso 30.8 — 6.9 2003 en Rimini, Italio

Mi estis la sola KELI-ano el la nordaj
landoj. De Arlanda mi flugis je 11.50 h
per Deutsche Lufthansa al Rimini. En
München estis ŝanĝo al alia aeroplano.
La alveno en Rimini estis je 16.10 h.
Mi devis serĉi aŭtobuson al la stacido-
mo. Montriĝis, ke germana esperantisto
ankaŭ veturis al la kongreso kaj preskaŭ
2 horojn ni bezonis por veni al la kon-
gresejo. Tie ni ricevis la dokumentojn
kun mapo kaj nomo de la hoteloj. Por
la distanco inter mia hotelo kaj la kon-
gresejo mi bezonis 20 minutojn pie-
de ĉiutage por tag- kaj vespermanĝo
en la hotelo kaj por partopreni la pro-
gramerojn.

Ni estis ĉirkaŭ 270 partoprenantoj
el 11 landoj. La plej granda grupo es-
tis el Pollando, 46 katolikoj. Italio kaj
Ĉeĥio ambaŭ havis 45 partoprenan-
tojn. El Rumanio partoprenis 21 kaj el
Germanio 16. Hungario havis 10 par-
toprenantojn.

La matenmanĝo estis je la 8a en la ho-
teloj. Dimanĉe la evangelia Diservo estis
en la Valdana Evangelia Preĝejo, unu-
hora promenado tien. Predikis sper-
ta esperantisto, sed ne pastro. Mi po-
vis veturi al mia hotelo por tagmanĝo
en lia aŭto.

Ĉar Adolf BURKHARDT pro malsano
ne povis partopreni, pastro A. KRONEN-
BERGER anstataŭis lin kiel kantgvidan-
to. La ekumena Diservo je la 16a oka-
zis en la bela paroĥa preĝejo Sanktaj Jo-
hano kaj Paŭlo apud la kongresejo. Ja-
cques TUINDER gvidis ĝin. En la gran-
da salono Peltier ni havis la oficialan

inaugŭron. Estis paroladoj itallingve de
la episkopo de Rimini kaj de reprezen-
tanta de la ministro por la Raportoj kun
la Parlamento. La itallingvaj paroladoj
estis tuj tradukitaj Esperanten. Poste la
partoprenintoj povis saluti de iliaj lan-
doj. Nun mi salutis de Britta, Anna kun
Mats, Bengt-Olof, Agneta, Karl BURE-
MO kaj la finnlanda estraro.

Kiel kutime la vespermanĝo estis
en la hoteloj je la 19.30. Poste sekvis
programeroj kaj tagfina preĝo en la kon-
gresejo. Lunde ni aŭskultis prelegon pri
la bela mozaiko en la preĝejo kun tek-
stoj en la itala lingvo kaj en Esperanto.
Du aŭ tri kunvenoj povis okazi sam-
tempe en apudaj salonoj. Marde ni ha-
vis duontagan ekskurson al San Mari-
no. La ĉeĥoj kaj la poloj veturis per siaj
propraj aŭtobusoj. La urbo estas bele
situata sed laciga pro la deklivoj. Por la
vespermanĝo ni kunportis sakon kun
pano, frukto kaj trinkaĵo.

Merkrede estis la granda ekskursta-
go. Jam je 6.30 ni povis matenmanĝi en
la hoteloj. Post unu horo la busoj for-
iris de la kongresejo. Ni iris por vidi la
urbon en kvar grupoj. Ni povis rigar-
di kelkajn preĝejojn el la 500-jara epo-
ko kun belaj mozaikoj. Ankaŭ la tom-
bon de Dante ni vizitis. Je 10.45 okazis
Sankta Meso gvidita de Lajos KOBOR en
la Baziliko de Sankta Johano. La prote-
stantoj devis iri al evangelia Baziliko
de Sankta Spirito, kie Jacques TUINDER
gvidis la Diservon sen muziko. Ni es-
tis 25 partoprenantoj. La reveturo oka-
zis je la 17.30. Vespermanĝon ni havis

en niaj hoteloj.

Ĵaŭde IKUE havis sian jarkunvenon en la granda salono. Nova prezidanto estas Miloslav ŠVÁČEK. La katolikoj decidis havi sian 57an kongreson venontjare en Litovio, Kretinga, 3/7–10/7 2004. KELI havis sian kunvenon en saloneto Patro Pio. Venontjare estos la kongreso denove en Ĉeĥio. La pensio nomiĝas Sola Gratia. La tempo estos 31/7 — 7/8 en la komunumo Hostyn, atingebla per trajno de Prago. La estraranoj estis reelektitaj. Zoltan Somhegy protokolis.

Poste mi povis prelegi pri Sankta Birgitta en la granda salono. Vendrede estis la adiaŭa vespero. Inter aliaj interesaj programeroj bele vestitaj ĉeĥaj knabinoj prezentis komedion, kantis kaj ludis flutojn. Ni ankaŭ povis vidi filmon pri Litovio. Sabate estis ekumena diservo kaj la adiaŭo.

Kiam mi venis al mia hotelo mi mendis taksion al la stacidomo por tie aĉeti bileton al Venecia, kie mi tranoktis en hotelo por vidi ion de la urbo kaj veturi per gondolo. Estis ege varme sed pluvis matene kiam mi bezonis portiston en motorboato al la stacidomo por veturi al Romo. Estis mendita ĉambro, lito kaj matenmanĝo por 50 eŭroj, du noktoj. Tiel malbone mi neniam loĝis kun malmulte por la matenmanĝo. Sed mi sukcesis veturi per aŭtobusoj al la domo de la Sankta Birgitta kaj poste al la Vatikano kun la grandioza Sankta Petro-preĝejo. Ĝi estas tre impona kaj vinda.

Por veturi al la flughaveno mi bezonis tri horojn. La trajno de la metroo bezonis tutan horon. El Arlanda mi veturis per la rapida trajno al Stockholm kaj de tie per trajno al Älvsjö, kie mi ha-

vis mian aŭton ĉe konata familio kaj pli frue bankkolego.


Estas tre laciga por mi en mia aĝo partopreni kongresojn kaj mi ne plution faros.

Arne LUNDKVIST



Raportado pri la kongreso

La 30an de aŭgusto, en la daŭro de la posttagmezo, iom post iom alfluadis la unuaj kongresanoj. Vere tropikis la temperaturo! La LoKoKo, en kiu ĉefe funkciis Erika DISCHER kun asisto de Vera TUINDER-DEKKER kaj Carlo SARANDREA (kaj kelkfoje Jacques TUINDER), havis multe da laboro por registri, disdoni nomŝildojn kaj dokumentojn, montri la vojon al hoteloj kaj enkasigi kongresajn kotizojn. La deĵoranta teamo fakte devus konsisti el poliglotoj, ĉar rekordis ĉikongrese ne nur la stati-



Pastor Magnani klarigas la belajn mozaikojn en la preĝejo. Atentu la surplanan mozaikon kun „Prenu kaj Manĝu”.

stiko de aliĝintoj sed proporcie ankaŭ la obstine eterna komencantaro... Ade disponeblis pastro Bernhard EICHKORN por solvi la plej komplikajn problemojn! Nur en la malfrua vespero, fine, alvenis busoj el Ĉeĥio, Pollando kaj Slovakio. Preskaŭ elĉerpitaj partoprenantoj el tiuj landoj, kiuj multe suferis pro la tuttaga varmego, devis fari grandan ĉirkaŭvojon tra neatenditaj landoj kaj regionoj (pro diversaj subitaj cirkonstancoj).

Ne ĉiu tre entuziasmis pri la disa loĝado en pluraj hoteloj, kiu malebligis kunan manĝadon, miksiĝon de kontaktoj, komunan preĝadon/kantadon antaŭ kaj post la manĝoj, kaj do ade rompis la kongresan etoson.

La Interkona Vespero, kiun bonvenige malfermis la prezidantoj de IKUE kaj KELI, ĉifoje havis tre specialan karakteron. La jamaj kongresanoj povis — en guste kaj laŭteme ornamita salono — ĉeesti triaktan teatraĵon, verkitan de Giorgio SILFER. Li mem enkondukis kaj gvidis sian spiritan infanon „La familio de Anto Speri” (Vidu en *Literatura Foiro*, junio 2003).

Paralele kun la kongresa programo okazis, laŭ invito de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS), Esperanto-kursoj por komencantoj kaj progresintoj. Gvidis A.Prof. N. KORŠENEVSKAJA-GOURIOU kaj Prof. Gennadij ŜILO.

La 31an de aŭgusto komenciĝis per kunveno, kiu celu prepari la kongresanojn por la tri diservoj: por la ortodoksaj (en la preĝejo de la Eniro de Maria en la Templon), la protestantaj (Valdana preĝejo) kaj la romkatolikaj partoprenantoj (preĝejo de Johano kaj Paŭlo). KELI-anoj direktis sin al sia diservo, kiun en franca kaj bona lingvoj je nia

surprizo gvidis esperantisto Maŭro Sorrelli. Ni ricevis tekstojn en Esperanto por povi sekvi la liturgion; la prediko estis dulingva.

Posttagmeze katolikoj estis invitataj kun Miloš ŠVAČEK preĝi la rozarion. La Ekumenan Diservon (16.00–17.00) antaŭis kanta preparado, kiun prizorgis pastro KRONENBERGER. Gvidis la diservon pri la kongresa temo (Vi estos Miaj atestantoj) Jacques TUINDER, kiu ankaŭ faris la predikon. Ni sekvis la Liturgion de Lima. Tuinder emfazis la rolon de la Sankta Spirito rilate al la invito al kristanoj atesti pri Jesuo Kristo kaj Lia mesaĝo.

Post la liturgio ni kolektiĝis en la granda salono pro la oficiala inaŭguro, kiun prezidis Antonio DE SALVO kaj Jacques TUINDER. Ni povis bonvenigi du monsinjorojn, i.a. la plenornatan episkopon de Rimini, Lia Ekscelenco Mariano DE NICOLO, kiu itallingve alparolis la kongreson. Eklezioj el la reformacio kaj la urbo ne estis reprezentitaj. Ĉeestis kaj parolis multmerita gravulo en Esperantio, Carlo MINNAJA. Sekvis salutoj, publikaj leteroj, informoj, komunikoj, ktp. La KELI-prezidanto transdonis la salutojn de Adolf BURKHARDT, multjara prezidinto de la Kristana Ligo kaj ĵusa Honora membro de UEA, kiu pro grava malsano bedaŭrinde ne povis veni. Ankaŭ Els VAN DIJK kaj Philippe COUSSON ne povis aliĝi, ĉar ili profesie laboras en lernejoj, kiuj jam komencis la novan jaron.

Kadre de la soleno Jacques TUINDER dankoplene kaj emocie ricevis leteron — kun — koverta el la manoj de Serio BOSCHIN, prezidanto de la Itala sekcio de IKUE, en kiu troviĝas 500 eŭroj kiel subteno al pioniro de alfabetigaj pro-

gramoj en Hindio.

Pastro KOBOR fermis la solenon per mallonga preĝo, post kiu ni kantis la finan kanton el *Adoru* (537).

Vespere kunsidis la Ekumena Komisiono de IKUE kaj KELI kun kelke da LoKoKo-anoj. Estis parolo i.a. pri venontjaraj kongresaj planoj. Ni ricevis inviton en 2005 ekumene kongresi en La Chaux-de-Fonds, kiun ni komune preparolis. Paralele *Anjo Amika* prezentis programon tre varian de siaj kantoj. Poste la tagfinan preĝon prizorgis pastro KRONENBERGER.

La 5an de septembro komenciĝis, je la 9a horo, per Ekumena Diservo, kiun gvidis la katolika pastro Ludoviko KOBOR. Li ankaŭ faris la predikon, kvankam — bedaŭrinde — ne pri la kongresatemo. Kantigis nin pastro Albrecht KRONENBERGER. Ĉiu laŭ propra konscienco rajtis partopreni la Eŭkaristion aŭ la Vespermanĝon.

En la mateno pastro KRONENBERGER preparolis kun malmulte da ĉeestantoj bibliajn tekstojn el la Evangelio laŭ Sankta Johano. Sekvis Jacques TUINDER, kiu parolis pri sia jam multjara helpo al homoj kun vidhandikapo. Li advokatis favore al du denaske blindaj infanoj el malriĉa Maroka familio, kies patro estas malsana kaj senlabora. Li klopodis varbi sponsorojn por helpi al tiu familio, loĝanta for de la plej proksima instituto por infanoj blindaj kaj malforte vidantaj. Anoncis sin du, kiuj kune kontribuis per 100 eŭroj. Kadre de la kongreso ne okazis monkolektado favore al la projektoj de *Fondaĵo Evidente*.

Paralele kongresanoj povis viziti alian salonon, en kiu Floarea POPA parolis pri la rumana poeto M. Eminescu, deklamante ankaŭ kelkajn liajn poeziaĵojn.

Je la 12a horo la tagmezian preĝon gvidis Siegfried KRÜGER, kiu impresplene parolis pri Jochen KLEPPER.

Posttagmeze prezentiĝis la ebleco (libervole) preĝi la rozaron kune kun frato Miloš ŠVAČEK. Sekvis tre interesa prelego fare de Riccardo LARINI, kiu parolis pri martiroj de la ekumeno. Poste Carlo SARANDREA instrue kaj informe kondukis nin kiel sprita gvidisto kaj interpretisto de 'skribaj atestantoj' tra cent jarkolektoj de „Espero Katolika”.

Je la 18a horo pastro EICHKORN invitis la kongresanojn informiĝi pri 'Liturgiaj Horoj', do pri la esperanta brevierio. Paralele, en alia salono, eblis ĉeesti aktualan kaj interesan diskuton inter la kvaropo KIEBOOM, MAGNANI, MBELLA kaj WITDOEKT pri „Esperanto en Afriko”.

La posttagmezian programon fermis ekumena vespro en la preĝejo, kiun gvidis pastroj EICHKORN kaj KRONENBERGER.

Je la 20.30 horo okazis la (tro longa) Adiaŭa Vespere, dum kiu la kongreso povis ĝui prezentadojn de „JET”-anoj, „La NeDia-Komedio” (Giovanni CONTI), Ĥoruso Emler kaj kantado de Anjo Amika. Gvidis, favore al la kongresakaso, loterion kaj aŭkcion Marija BELOŠEVIĆ kaj Carlo SARANDREA.

La IKUE-prezidanto dankis, en la nomo de la tuta kongreso, la membrojn de la LoKoKo per simbolaj donacoj, t.e. kandeloj donantaj lumon kaj salo por havigi guston al la kristana vivo.

La 6an de septembro ni devis disiri. Je la 9a horo okazis varma adiaŭa soleno, kiun gvidis la freŝe elektita IKUE-prezidanto Miloš ŠVAČEK. Prezentiĝis la lasta okazo komune kanti el ADORU kaj preĝi. La kongresan semajnon re-


sumonte, parolis en la nomo de IKUE Carlo SARANDREA kaj en la nomo de KELI Eva FARKAS-TATAR. Ni finis la celbron kantante „Ni iru en paco”.

Plej kore vin kaj la viajn salutas,

Vera kaj Jacques



Kongresaj fotoj



Kongresanoj post la Diservo.



Dum la kunsido...



Post la jarkunveno.



Gesinjoroj MATTHIAS apud la preĝejo.

„VI ESTOS MIAJ ATESTANTOJ!“

Ĉiu el ni konas en sia ĉirkaŭaĵo religianojn, kiuj ofte pilgrimas tra la stratoj, frapante sur ĉiu pordo kaj esperante per paroloj kaj skribaĵoj vekti interesiĝon pri sia konvinko. Kelkfoje iom fanatike, ofte sensukcese. Kaj ili mesaĝas: *Vekiĝu, karaj homoj, jam alproksimiĝas la Regno de Dio!* Ni konas ilin kiel atestantojn, kaj la maniero en kiu ili publike manifestiĝas pri sia konvinko, efektive estas atestado! La konatiĝo kun tiu religio tute ŝanĝis ilian vivon kaj same aliigu la vivon de novaj adeptoj. Tial ili agas ‘konstante frapante’... Al la kategorio de eksplicite kaj ĉefe karitate atestantaj kredantoj nepre apartenas ankaŭ la Savarmeanoj.

Unu el la plej kortuŝaj dokumentoj el la lulilperiodo de nia movado sendube estas la fama letero al Borovko pri la Deveno de Esperanto (1896), en kiu ni legas kiel la kvinjaraĝa Ludoviko Zamenhof estis atestanto pri la plej teruraj kruelaĵoj tiutempe okazintaj en Bjalistoko. Li propraokule vidis kaj propraorele aŭdis homojn diversgentajn kun propra lingvo kaj propra religio. Sed ili kondukis inter si malhome, nehumane: lupe kaj ŝakale. Kaj tiu knabeto en tiu momento ekhavis klaran, preskaŭ ordonantan, intuicion, kiu ŝanĝos kaj difinos kaj determinos tutan lian vivon. Nu, vi scias, ke en la centro de tiu vivo staris ‘la altaro de la devo ordonanta’, kiel li mem poste konfesos en konata poemo. „Kiam mi estos matura homo, mi elpensos rimedojn kontraŭ tiu nehominda situacio!” En tiu aĝo, kiam

esperantismo kaj homaranismo kaŝiis ankoraŭ malantaŭ la socia horizonto, li jam — infan-nivele — estis revanta pri komuna neŭtrala lingvo kaj bazaj etikaj principoj. Sangaj pogromoj kondukis la knabeton al profunda pripensado kaj silenta protestado, kaj poste al vivon ampleksanta misio.

Antaŭ du mil jaroj naskiĝis en fora loko knabeto, pri kiu aliaj homoj diris, ke Li venis por viziti kaj liberigi sian popolon, alportante mesaĝon pri graco, kompatemo, pardono kaj repaciĝo. Komenciĝis pleneco de la tempo, ekvivis nova sento kaj aŭdiĝis forta voko. Multaj atestis pri tiu granda homo, Filo de Dio kaj Filo de Homoj. Li vivis kiel Justulo, kiel sankta Instruisto kaj nobla Bonfaranto. Li venis kiel lumo por forpreni mallumon el la mondo, sed lia vivo ŝajne malsukcesis kaj finiĝis sur kruco; oni punis Lin kiel danĝeran krimulon. Sed ĝuste tiu Jesuo releviĝis, reviviĝis kaj venkis la morton. Li predikis lingvon de espero, alvokis al amo kaj gefrateco. En la daŭro de dudek jarcentoj multaj atestis pri la naskiĝo kaj vivo, morto kaj releviĝo de tiu unika kaj sankta homo.

La temo de nia kongreso estas prenita el libro, verkita de Sankta Luko. Ĝi priskribas la agojn de kelkaj apostoloj kaj prave kromnomiĝas ‘La Evangelio de la Sankta Spirito’. La Sankta Spirito estas la gvidanta motoro en tiu inspirita kaj inspira verko; jam en la unuaj versoj ni aŭdas pri Li!

Kiam la apostoloj kunvenis en Jeru-

salemo, Jesuo diris, ke la Sankta Spirito per sia povo venos sur ilin. *Kaj vi estos Miaj atestantoj en la Urbo de Paco kaj en tuta Judujo kaj Samario kaj ĝis la plej malproksima parto de la tero.* Ni aŭdas kiel homoj timemaj fariĝis fortaj, dinamikaj kaj misiemaj. Ili estis atestantoj pri vortoj kaj faroj de Jesuo, kaj tio plene ŝanĝis ilian vivon. Ili vere spertis ke venis en la mondon nova sento kaj komprenis la fortan vokon de la Sankta Spirito. IRU, INSTRUU, KURACU kaj BAPTU. Jen plej al vi konataj evangeliaj imperativoj! La unuaj sekvintoj de Jesuo klare ricevis la ‘dinamitan’ povon de la Sankta Spirito, por ke ili mondvaste disiru kaj atestu.

Por ni esperantistoj la Pentekosta Evento havas signifon tre specialan; sed hodiaŭ emfazendas ke la ĉefrolanto de tiu Festo de Forta Vento kaj Fajraj Langoj estas la promesita Sankta Spirito. Ni scias ke Li malleviĝis sur homojn unanime kolektiĝintajn en unu loko. Kaj ni aŭdas ke Li pleniĝis la tutan domon kaj la tutan homon. La Sankta Spirito estas la plej granda donaco elĉiele verŝita kaj ĉeestanta ĉie kaj ĉiam, ĉi tie kaj nune. Donaco, kiu estas samtempe misio, tasko kaj komisio. Donaco kiu instigu nin al atestado. Kaj dum ĉi tiu kongresa semajno ni, sub la flugiloj de la Spirito, klopodu pripensi kiel disĉiploj de Jesuo iĝu lumo de la mondo kaj salo de la tero.

Unu el la plej oftaj predikistoj en la Evangelio de la Sankta Spirito estas la apostolo Petro. Li ne parolas laŭ propra iniciato, sed pelas al tio la lin pleniĝanta Spirito. Kaj tiu Spirito donas al li konsolon kaj forton kaj kuraĝon por diri tion kio absolute estas direnda. Kaj vidu, post lia atestado ĉiuj aŭskultintoj

pleniĝas de la Sankta Spirito kaj komencas kuraĝe paroli la Vorton de Dio.

Same pri Paŭlo rakontas Luko, ke li post sia konvertiĝo estis plenigita de la Sankta Spirito. Tiu pleneco, sekve, estas nepra kondiĉo por fruktodona atestado.

Ni bone komprenu, ke atestado ne estas senriska afero. En la Evangelio de la Sankta Spirito ni aŭdas pri konflikto inter diversdevenaj Judoj rilate al la diakonio de vidvinoj. Tiam la apostoloj petis ke oni indiku sep homojn, bone atestatajn, plenajn de la Spirito kaj de saĝo. Kaj la nomo de unu el la elektitoj estis Stefano, viro plena de fido kaj de la Sankta Spirito, plena de graco kaj potenco; sur lin la apostoloj metis la manojn. Kaj tiu anĝelvizaĝa atestanto Stefano estis kondukata al la sindrio, kie kulpigis lin atestantoj plenaj de mensogemo. Kaj Luko zorge notis el la buŝo de Stefano, atestanto plena de la Sankta Spirito, predikforman defendon antaŭ la tribunalo. Sekvis fine ŝtonmortigo, kaj la atestanto Stefano fariĝis la unua martiro. Li mortis kun analogaj vortoj sur la lipoj, kiujn Jesuo parolis sur la kruco: „Sinjoro, ne metu sur ilin, miajn mortigantojn, ĉi tiun misfaron!”

Ne, atestado pri Jesuo kaj Lia mesaĝo ne estas senriska afero. En la unuaj jarcentoj, kiam la kristanoj vivis katakomban ekziston, dekmiloj atestis en areno inter leonoj per sia sango. Ili eniris la historion kiel martiroj. Sed tiuj tempoj de persekutado de homoj kun religia konvinko ankoraŭ ne finiĝis. Neniu jarcento faris tiom da martiroj kiel la dudeka! Ĉu ne estas miraklo, ke neniu ĉi tie persekutas nin pro nia kristaneco? Ĉu estas certe ke ni estas bonaj, fidelaj, kuraĝaj, integraj atestantoj? Ĉu ni ate-

stas, ankaŭ per niaj protestoj en tiuj lokoj kie potenculoj malrespektas la benojn de tero, akvo kaj aero, kaj eĉ minacas au atakas la homan vivon? Ĉu ni ĉeestas en amasdemonstracioj kontraŭ milito kaj perforto kaj maljusteco kaj infanekspluatado? Ĉu ni vidas nin mem kaj la mondon per la okuloj kaj oreloj de la pra-atestantoj, kiuj spertis ke la renkontiĝo kun Jesuo kaj Lia mesaĝo tute ŝanĝis ilian vivon?

Ke dum ĉi tiu semajno ni ofte alvoku la Sanktan Spiriton, petante ke Li konvertu nin. Li estas la plej bona instruisto pri atestado. Li nomiĝas donanto de donacoj. Li donu al ni, ke en malluman mondon ni disvastigu iom da lumo kaj saligu sengustan teron per la konscio kaj adekvata praktiko, ke la Regno de la Ĉielo survojas kaj jam proksimas. Amen.

Jacques TUINDER



Predikas Jacques Tuinder. Apude Miloš ŠVÁČEK.

Jacques TUINDER en evangelia Diservo dum tuttaga ekskurso en Ravenna, 3-9-2003

PREDIKO

Karaj gefratoj, ĉu estas ankaŭ via impresio, ke oni nur tre malofte aŭdas predikon pri la temo ĜOJO? Tio estas malfacile komprenebla, ĉar ĝin tre ofte akcentas la sanktaj skriboj. Ĉu estas io pli bela ol ĝoja koro? Pri ĝi la biblio diras, ke ĝi 'faras la vizaĝon ĝoja' (Sent.15:13). Kiel ruĝa fadeno tiriĝas tra la inspiritaj libroj la varma esprimo 'por ke via ĝojo estu plena, kompleta!' Jes, ni, homoj, estas inter ni donitaj por ke ni reciproke donacu kaj ricevu ĝojon!

En la unua legaĵo ni aŭdis la voĉon de la profeto Jesaja (61:10-11), kiu forte ĝojas pri la Eternulo, ĉar Li mantelis lin per vestoj de savo kaj justeco. La apostolo Johano skribas sian duan leteron, 'por ke nia ĝojo kompletigu' (1 Joh.1,1-5). Kaj ni, espereble amikoj de la fianĉo, ĝojas pri la voĉo de la fianĉo (Joh. 3:25-30)!

Unu el la bibliaj verkistoj kiuj multe parolas pri ĝojo, estas Sankta Paŭlo. Inter la fruktoj de la Spirito, kiujn li mencias en sia letero al la Galatoj (5:22), troviĝas ankaŭ la ĝojo: amo, ĝojo, pacienco, komplezo, bonkoreco, fideleco, mildeco, sinregado. Ofte estas rilato inter la Sankta Spirito kaj ĝojo. Pri la Tesalonikanoj (1 Tes. 1:6) Paŭlo scias, ke ili ricevis 'la vorton en multe da aflikto kun ĝojo de la Sankta Spirito'. Li skribis al ili: 'Kian dankon ni povas repagi al Dio pri vi, pro la tuta ĝojo, per kiu ni ĝojas pro vi antaŭ Dio' (1 Tes. 3:9). Al

la Filipianoj (2:2) li petis: 'plenigu mian ĝojon'. Kristanoj preĝu kun ĝojo (Fil. 1:4) kaj akceptu kunfraton en la Sinjoro kun plena ĝojo (Fil. 2:29). Paŭlo nomas la Tesalonikanojn (1 Tes. 2:19-20) 'mia gloro kaj mia ĝojo' kaj la Filipianojn 'mia ĝojo kaj mia krono'. Estis por li konsolo multege ĝoji pro la ĝojo de kunhelpanto (2 Kor. 7:13). Kaj Li ĝojis pro la amo de Filemon (7). Kaj tiel plu. Kaj tiel plu. Kristanoj estu inter si fonto de ĝojo!

Al sia amata komunumo en Filipino Paŭlo turnis sin skribante: *Ĝoju en la Sinjoro ĉiam; denove mi diras: Ĝoju, ĉar la Sinjoro estas proksima* (4:4).

Pri ĝojo ni aŭdas jam en la komenco de la nova tempo, kiam anĝelo diris al Zeĥarja: *Ne timu, ĉar via preĝo estas aŭdita, via edzino naskos al vi filon [...]. Kaj vi havos ĝojon kaj feliĉon, kaj mul-*



Interne de la kapelo.

taj ĝojos pro lia naskiĝo (Luko 1:13). Kaj estis anĝelo kiu diris al la betlehemaj paŝtistoj: *Ne timu, ĉar jen mi venigas al vi bonan sciigon de granda ĝojo* (Luko 2:10). Kaj saĝuloj vidis stelon super la loko, kie naskiĝis tiu Anonconto de ĝojiga mesaĝo. *Kaj ili ĝojis kun tre granda ĝojo* (Mat. 2:10). Ĉu tiu ĝojo konas eĥon kaj reeĥon en niaj koroj, en niaj

tagoj, sur nia tero? Kion vi opinias?

Estas bone aŭdi, ke la unua vorto de elĉiela mesaĝisto ĉiam estas: NE TIMU!

Neniu el ni povas nei, ke timo ludas grandan rolon en homaj vivoj, nelaste ĉar ni troviĝas en mondo kiu plurnivele nin minacas kaj terurige atakas. Pri tiu mondo ni ĉiutage legas en ĵurnaloj kaj aŭdas per televidaj novaĵoj. Ni timas, ĉar ni ne vivas kiel liberaj homoj savitaj sed ofte kiel lupoj sovaĝaj kaj ankoraŭ ne konvertitaj. Ni nepre timas, ĉar nia propra vivpraktiko nur malmulte harmonias kun la evangeliaj invitoj kaj normoj.

Tamen ni devas preni la alvokon de Paŭlo serioze, certe ankaŭ pro la ripetiĝo: *Ĝoju en la Sinjoro ĉiam; ade kaj ade mi emas diri: Ĝoju!* Tre ofte ni renkontas la temon de la ĝojo en lia belega letero al la Filipinoj! Ne ilia timo estu konata al ĉiuj homoj, sed ilia mildeco, humaneco. La grekan vorton ni povus traduki ankaŭ per: cedemo, indulgemo, modesteco. Vivon de kristano karakterizu sankta harmonio kaj aparteno al rondo familia en konsento, vortoj kiujn ni tiom ofte kantas en „La Espero” de d-ro Zamenhof.

Kaj kial ni ade kaj ade ĝoju en la Sinjoro de tago al tago? Paŭlo mencias la kialon: ĉar Li estas proksima. Jes, la Sinjoro estas nia proksimulo! Ĉie kie nin bonvenigas proksimulo, ni renkontas La Ĉielan Proksimulon. Tial *pri nenio ni trozorgu!* (4:6). Kun Jesaja ni konfesu kaj kantu: *Mi forte ĝojas pri la Eternulo, mia animo ĝojas pri mia Dio!* Al Dio ni iru kun espero kaj fido, petante ke Li plenigu niajn korojn, por ke nia ĝojo, hodiaŭ kaj ĉiujn niajn vivotagojn, estu kompleta.

BENOJ POR BENI ALIAJN

Kaj Tiu, kiu donas semon al la semanto kaj panon por nutraĵo, donos kaj multobligos vian semotan semon, kaj plimultigos la fruktojn de via justeco; dum vi pliriĉigos en ĉio AL ĈIA MALAVARECO, kiu efikas per ni dankadon al Dio.

(2 Korintanoj 9:10–11)

Denove, mi deziras al vi feliĉigan kaj prosperan novjaron (2004). Kiel mia edzino kaj mi antaŭe preĝis por vi, Dio benu vin pli kaj pli ĉi-jare nome de Jesuo. Amen. Tamen, mia unua „Spirita Nutraĵo” ĉi-jare temas pri tiu preĝo.

Mi estas certa ke Dio benos vin pli kaj pli ĉi-jare. Sed, la benoj de Dio por vi ne estas por vi sola. Ili estas por difinita celo: por ke vi ankaŭ estu kanalo de benoj al aliaj homoj. Li volas ke vi donu al la bezonantoj.

Li volas ke vi aldonu la motivon de evangelia misio. Li volas ke vi donu malavare (Agoj 4:31–35; 2 Korintanoj 9:6–12; Galatanoj 6:6; Filipianoj 4:14–19).

Kiuj estas la manieroj de ĉi tiu donado?
— Unue donu vin mem al la Eternulo

(2 Korintanoj 8:5);

— Donu kun aŭtentika motivo (Mateo 6:1–4);

— Donu en amo (1 Korintanoj 13:3);

— Donu laŭ via povo (Agoj 11:29); kaj

— Donu ĝoje (2 Korintanoj 9:5, 7).

La mezuro de la donado devas esti senlima. Mi povas certigi al vi ke ju pli vi donas des pli vi ricevos de Dio (Luko 6:38; 2 Korintanoj 9:6).

Unu disdonis, kaj riĉiĝas ĉiam pli; alia tro avaras, kaj tamen nur malriĉiĝas. Animo benita ĝuos bonstaton; kaj kiu trinkiĝas, tiu mem havos sufiĉe por trinki (Sentencoj 11:24–25).

Bonokululo estos benata; ĉar li donas el sia pano al malriĉulo (Sentencoj 22:9).

Ĉi tiu jaro estu jaro de abunda beno por vi. Vi estu etendo de la benoj de Dio al aliaj homoj!

Je la servo de Dio,

pastoro Bayo AFOLARANMI



ALVENU KUN KURAĜO

Ni do alvenu kun kuraĝo al la trono de graco, por ke ni ricevu kompaton kaj trovu gracon por ĝustatempa helpo.

(Hebreoj 4:16)

En kiu ni havas kuraĝon kaj alkondukon en fido per nia fido al Li.

(Efesanoj 3:12)

Finfine, ĉi tiu malnova jaro finiĝas! La nova jaro venos kun multaj esperoj kaj atendoj. Ĉu ni devas timi? Nepre ne! Ĉar ni servas al Tiu kiu tenas la estonton. Ni povas kanti kun la himnverkisto angle: „Because He lives I can face tomorrow. Because He lives all fear is gone. Because I know He holds the future, And life is worth the living, just because He lives”.

(Esperante: *Ĉar Li vivas mi povas alfronti morgaŭon. Ĉar Li vivas ĉiu timo estas for. Ĉar mi scias ke Li tenas la estonton, Kaj la vivo estas vivinda ĝuste ĉar Li vivas.*)

Honeste rigardu vin mem. Ĉu ĉi tiu pasinta jaro estis malfeliĉiga por vi? Alkroĉiĝu al Dio por pli bona, pli granda afero en la venonta jaro.

Ĉu vi estis malkontenta pri io ĉi tiun jaron? La venonta jaro estos asignita jaro por bonaĵo por vi.

Tio, kion vi bezonas, estas alveni kun kuraĝo al la trono de graco kaj sciigi viajn dezirojn al Dio. Estu libera en Lia ĉeesto. Jesuo Kristo diras: *Ĝis nun vi petis al vi en mia nomo; petu, kaj vi ricevos, por ke via ĝojo estu plena (Johano 16:24).* Diru al Lia tion, kion vi volas, ke Li faru por vi en la jaro 2004, kaj kredu ke Li faros ĝin.

Havante do, fratoj, kuraĝon eniri en la plejsanktejon per la sango de Jesuo, per la vojo nova kaj vivanta, kiun li dediĉis por ni, tra la kurteno, tio estas, lia karno, kaj havante grandan pastron super la domo de Dio, NI ALPROKSIMIĜU KUN SINCERA KORO, EN PLENECO DE FIDO, kun niaj koroj aspergitaj for de malbona konscienco, kaj kun la korpoj lavitaj per akvo pura; ni tenu firme la konfeson de nia espero sendekliniĝe; ĈAR LA PROMESINTO ESTAS FIDELA (Hebreoj 10:19–23).

Dio atendas vin. Vi bezonas enveni Lian

ĉeeston kun certeco ke Li neniam rifuzas bonaĵojn de vi ĉi tiun venontan jaron.

Feliĉan Novjaron 2004!

Je la servo de Dio,

pastoro Bayo AFOLARANMI



Kial ne alporti brikon por Domo de Paco en Kaŝmiro?

Al malmultaj el vi estas konate, ke la ekumena bonfara organizaĵo „Sovaĝaj Anseroj”, kies sidejo troviĝas en Nederlando, jam kvarfoje sponsoris projektojn de Fondaĵo Evidente per reĝaj mondonacoj. La samaj „Anseroj” helpas ankaŭ al grava kaj necesa projekto pri kiu mi volonte informos la legantojn de „Dia Regno”.

„Kaŝmiro estas peco de paradizo surtera”, oni diris antaŭ dekoj da jaroj. Temas pri la limregiono inter Hindio kaj Pakistano, kiun karakterizas diverseco de homoj, religioj, lingvoj kaj kulturoj. Iam multaj pasigis sian someran libertempon en kaj ĉirkaŭ la ĉefurbo Srinagar por tiel eskapi la neelteneblan varmegon en aliaj partoj de Hindio.

Nun oni ne plu vidas tie libertempantojn; anstataŭe ĉirkaŭiras soldatoj gardantaj ĉiujn registarajn konstruaĵojn, la urban centron, riverbordojn kaj strategiajn vojojn. La iama prospera vivo sociala kaj ekonomia plene lamiĝis, kaj la paradizo sekve fariĝis infero.

En la preskaŭ lilipluta oficejo de la „Jamua kaj Kaŝmira Ligo por Civila Socio” pendas fotoj de malaperintaj parencoj, gazeteltranĉaĵoj pri forpasintaj personoj kaj rakontoj de paco-aktivuloj. Ĉi

ĉio laŭte atestas pri vasta malrespekto al homaj rajtoj. La pac-organizaĵo havas apenaŭ troveblan oficejon en la urbo Srinagaro; ĝi ofertas lokon al maksimume ses personoj...

Oni tre esperas baldaŭ disponi pri memstara ejo, 'domo de paco'. Tie homoj, kiuj intencas dediĉi sin al paco kaj justeco, povas renkonti unu la alian, sekvante trejnadojn en pacmaniera solvado de konfliktoj, aranĝi kursojn, sed nelaste ankaŭ havigi helpon al viktimoj de perforto, al virinoj kiuj suferas pro malperfortaj edzo aŭ filoj.

La Domo de Paco havigu lokon por akcepti gastojn, kiuj per siaj spertoj kaj kuraĝigoj apogas pac-aktivulojn kaj sentigas ilin, ke ili ne solaj bataladas. La estiĝo de la konflikto en Kaŝmiro reiras al 1947, al la jaro en kiu la Brita kolonio dispartiĝis en islamkonfesan Pakistanon kaj ĉefe hindureligian Hindion. Jam baldaŭ eksplodis batalo inter ambaŭ rilate al la estonteco de Kaŝmiro. En 1948 oni decidis duonigi Kaŝmiron per 'Linio de Kontrolo' kiel provizora limo. Al la popolo oni promesis referendumon pri definitiva limo, sed ĝi neniam okazis. Tiel Kaŝmiro restis ĉiutaga kampscenejo inter du batalantaj partioj. Ĉar ambaŭ landoj disponas pri nukleaj armiloj, oni ne pensu pri tio ke la batalo finiĝos per atombombado. Kompreneble la popolo de Kaŝmiro suferas sub la perforto kaj la strangolado flanke de pakistana islamfundamentalistoj kaj hindiaj servoj por sekureco.

Pluraj nederlandaj sponsoroj helpas al la menciita Ligo por Civila Socio, kunliganta sendependajn pac-organizaĵojn kiuj subtenas senperfortajn iniciatojn kaj organizaĵojn de civitanoj, trarompante la politikan izolite-

con de Kaŝmiro.

Unu el la plej konvinkitaj paco-aktivuloj estas Parvez Imroz. Li laboras kiel advokato kaj precipe specialiĝis sur la kampo de homaj rajtoj. Li kuniniciatis la starigon de Ligo por Civila Socio.

Jam de la jaro 2000 ekzistas forta kunlaboro inter ĝi kaj la Nederlanda porpaca movado. Ke la starigota Domo de Paco, laŭ la vojo de dialogo, renkontigo kaj senperforta solvado de konfliktoj, efektive veran kaj daŭran pacon en regiono kun multaj forigitaj viroj kaj plorantaj virinoj, kun ĝenerala malriĉeco kaj senfutura junularo, kun sistema subpremo, teroro kaj izoliteco!

Jacques TUINDER

Giovanni CONTI, kiu partoprenis la EK en Rimini, estas la inciatinto de la prezentado de la vorto Esperanto okaze de la beno.

Papo Johano Paŭlo II. Beno „Urbi et Orbi kaj Esperanto“

Ekde pasko 1994 salutas la Papo Johano Paŭlo la 2a antaŭ la beno en la latina „Urbi et Orbi“ (ĉiufoje Pasko kaj Kristnasko). La benado estas mondvaŭte distribuata per la televido.

Pastro Duilio MAGNANI el Rimini, honora prezidanto de IKUE, skribis je 9.7.2002: „El Rimini oni petas (1994) al la Papo mesaĝi tutmonden en Esperanto Kristnaske kaj Pasko“. Li mem, kiel prezidanto de IKUE formulis ĉi tiun proponon, verŝajne ĉar li mem ne volis esti nomata.

En la longa vico de pli ol 54 uzitaj lingvoj estas Esperanto kaj poste la pola,

patrina lingvo de la Papo, ĉiufoje kulmine de la salutoj. Post ĉiam sekvas la fino per la beno en la latina.

La teksto 1994 estas: „Feliĉan Paskon en Kristo Resurektinta“ (Fonto: L'Osservatore Romano 5-6.4.1994. S. 5 kaj Espero Katolika 1-5/1994 p.13) kaj okaze de kristnasko: „Dibenitan Kristnaskon kaj prosperan Novjaron“ (Fonto: L'Osservatore Romano 27-28.12.1994)

Je pasko 2000 salutis la Papo en jenaj 57 lingvoj: (nombrado itale):

Albanese, Arabo, Armeno, Bengalese, Bieloruso, Bulgaro, Cambogiano, Ceco, Cinese, Coreano, Croato, Ebraico, Esperanto, Estone, Etiopico, Filipino, Finlandese, Francese, Georgiano, Giapponese, Greco, Indi, Indoneziano, Inglese, Irlandese, Italiano, Kinjarwanda, Kirundi, Latino, Lettone, Lituano, Lussemburghese, Malayalam, Malgascio, Maltese, Neerlandese, Polacco, Portoghese, Romanès, Rumeno, Russo, Serbo-Lusazia, Serbo, Singalese, Slovacco, Sloveno, Spagnolo, Suahili, Svedese, Tamil, Tedesco, Thailandese, Turco, Ukraino, Unghereze, Urdu, Vietnamita.



Esperantistoj kun ŝildo ESPERANTO sur la placo de s-ta Petro en Romo.

Samkiel dum la du antaŭaj benoj Urbi et Orbi (2002), Kristnaske de la pasinta jaro, kaj je Pasko, ankaŭ ĉi-foje grupo de esperantistoj ĉeestis en placo sankta Petro por levi alte la panelojn kiuj konsistigis la vorton „Esperanto“. La iniciato, gvidata de la itala samideano Giovanni Conti, celis danki la Papon pro la esperantlingva bondeziro. La skribon Esperanto oni povis vidi ankaŭ dum la mondovizia televida elsendo.

La grupeto de esperantistoj tre laŭte salutis la Papon, kaj ilia voĉo atingis lin, kaj tra la mikrofonoj ĝi estis aŭdebla en la televidaj kaj radiaj elsendoj.

El „Ljus i Öster“ (Lumo el Oriento), n-ro 8, novembro 2002

Miraklo kun la pordo de ĉelo en malliberejo en Nagalando (Hindio)

Kiam Precilla, misiistino, estis arestita pro tio ke ŝi predikis pri Jesuo, okazis miraklo, kiu kondukis multe da homoj al la kredo. La ŝlosita pordo de ŝia ĉelo trifojie mirakle malfermiĝis. De tio sekvis, ke ŝi estis liberigita kaj ricevis permeson libere prediki.

Ŝi laboras en Nagalando. Ŝi kaj du ŝiaj plej bonaj amikinoj, kiuj sekrete estiĝis kristaninoj, en septembro 2002 estis arestitaj en Rokitokk, norde de Nagalando en Hindio.

La kaŭzo, pro kio ili estis arestitaj, estis, ke Precilla sincere predikis la evangelion dirante, ke ne ekzistas alia savanto krom Jesuo Kristo. Ŝi klarigis, ke Jesuo estas la sola, kiu kapablas sanigi kaj doni vivon. Multaj vilaĝanoj montris sian intereson kaj ve-

nis por aŭskulti.

En la malliberejo oni ordonis al ŝi nek kanti nek rakonti pri Jesuo. Precilla ne atentis tion sed parolis al la ceteraj gearestitojn pri Dio. Krome ŝi atestis al kaj la policistoj kaj siaj provosoj. En la malliberejo oni ne donis al ŝi manĝaĵon.

Al la provosoj ŝi klarigis, ke ŝi ja ne faris iun krimon. Nur ke ŝi rakontadis pri la sankteco de Dio kaj Lia kapablo savi la homaron.

Al la estraro de la malliberejo ŝia parolo aspektis teda, kaj ili enŝlosis Precillan kaj ambaŭ ŝiajn amikinojn en unu ĉelo. Ili ne plu havis intereson ŝin aŭskulti.

Post unu horo Precilla tre klare aŭdis, ke la seruro estis malfermita. Tamen ŝi ne vidis, kiu tion faris. Ŝi alvokis provoson kaj raportis, ke la pordo de la ĉelo ne estas ŝlosita. Li alvenis, konstatis ke la ĉelo vere estas malfermita kaj zorge postulis de ŝi informojn pri kiel tio okazis. Ŝi respondis: „Mi ne scias. Eble iu de vi havas ekstran ŝlosilon. Mi nur aŭdis, ke iu malfermis la seruron”.

La provoso kaj la ĉefo de la malliberejo denove per seruro fermis la ĉelon, tre zorge kontrolis, ke la pordo estas ŝlosita kaj foriris.

Precize unu horon poste la samo okazis. Tre evidente Precilla aŭdis, ke la seruro estas malfermita kaj pro tio ŝi denove alvokis la provoson. Ĉi tiun fojon la ĉefo de la malliberejo persone turnis la ŝlosilon por certigi, ke la pordo de la ĉelo vere estas ŝlosita. Denove post unu horo la samo ripetigis.

Nun la ĉefo de la malliberejo kaj la provoso turnis sin al Precilla dirante: „Nun ni komprenas, ke vere vi faris ion malbonan kontraŭ neni. Ni punis vin kaj viajn amikinojn sen iu kaŭzo. Elvenu el la ĉelo. Kaj nun ni donas al vi tutan rajton prediki pri via dio al la homoj en la urbo”. Krome, la ĉefo de la policistoj demandis: „Ĉu eble via dio estas

pli potenca kaj pli forta ol nia dio?” Precilla demandis: „Kiu estas via dio?” La ĉefo de la policistoj respondis: „Ni adoras la sunon kaj la lunon”. Precilla diris: „Ni adoras la Dion, kiu kreis la sunon kaj la lunon”. Ŝi tuj al li legis el Genezo kaj la unuan ĉapitron de la evangelio laŭ Sankta Johano.

La ĉefo de la policistoj deklaris: „Ĉi tio estis io nova kaj kion pli frue ni ne aŭdis. Ni aŭdis pri kristanismo, sed ne en tiu maniero. Estas la unua fojo en mia vivo, ke mi aŭdis ion el la vortoj de Dio”.

Precilla kun siaj amikoj elpaŝis el la malliberejo kun sento de venko. Temis pri miraklo farita de Dio, miraklo kiu gvidis multajn al saviĝo.

(Komparu Agoj 5:19)

trad. kaj adapt. Arne LUNDKVIST



Filipianoj 2:5–8

Tiu sama spirito estu en vi, kiu estis ankaŭ en Kristo Jesuo, kiu, estante en la formo de Dio, ne rigardis kiel ŝatindaĵon la egalecon kun Dio sed sin malplenigis, alprenante la formon de sklavo, fariĝante laŭ la bildo de homoj; kaj troviĝinte laŭfigure kiel homo, li sin humiligis kaj fariĝis obeema ĝis morto, eĉ ĝis la morto per kruco.

PREĜO: Savanto de la mondo, mi preĝas por ĉiuj, kiuj laboras por la disvastigo de Via regno. Elverŝu vian benon super ĉiuj, kiuj atestas pri Vi inter malriĉuloj kaj perditoj, inter potenculoj kaj simpluloj, en ĉi tiu lando kaj sur la tuta tero. Amen.

Jelly KOOPMANS–SCHOTANUS

DIO ALPAROLAS SIAJN INFANOJN

(Mateo 2, 1–12)

5. Jesuo estas reĝo de la Judoj

En la tempo kiam Jesuo naskiĝis, regis en Jerusalemo reĝo Herodo. Neatendite alvenis en Jerusalemo tri magoj el oriento kaj ili demandis: *Kie troviĝas la novnaskita reĝo de la Judoj? Ni rimarkis la leviĝon de lia stelo kaj ni venis por Lin omaĝi.*

Kiam Herodo tion aŭdis, li konfuziĝis kaj tuta Jerusalemo kun li. Li venigis al si la sacerdotojn kaj la instruistojn kiuj estis bone informitaj pri la sanktaj Skriboj kaj li demandis al ili: *Kie naskiĝos la Mesio, la Savanto? Ili respondis: Li naskiĝos en Bet-Leĥem, ĉar la profeto Miĥa diris: Bet-Leĥem en Jehudujo, vi estas grava, princa urbo, ĉar sur via teritorio naskiĝos viro kiu kondukos mian popolon Izraelon kiel gvidanto.*

Herodo sendis la tri magojn al Bet-Leĥem: *Iru kaj serĉu tiun infanon kaj se vi ĝin trovas, sciigu tion al mi. Tiam ankaŭ mi povas iri por ĝin omaĝi.*

La tri magoj survojiĝis kaj la stelo kiun ili vidis en oriento antaŭiris ilin. Kiam ĝi haltis super la domo en kiu estis Jesuo, ili ĝojegis. Ili eniris la domon, trovis Marian kaj la infanon, profunde kliniĝis antaŭ Li kaj omaĝis Lin. Kaj tiam ili prezentis siajn donacojn: oron, incenson kaj mirhon. Sed dumnokte Dio ordonis ilin ne reiri al Herodo. Pro tio ili reiris al sia lando laŭ alia vojo.

G. F. De RUYVER F.C., Belgio

Jekaterinburgo: Caraj tagoj

Somere en la jaro 2003 en julio la esperantistoj de nia regiono partoprenis la solenan malferman Diservon en la Templo-sur-Sango, dediĉita al la lasta caro kaj lia familio, kiu estis senkompatate mortigita de komunistoj en la jaro 1918.

Dum la Diservo meze de julio la templo estis plenigita de multaj homoj, kiuj venis el la aliaj urboj de Ruslando kaj el aliaj landoj.

La templo konsistas el la malsupra kaj supra temploj. En la malsupra templo ni povis vidi memor-muzeon, kie troviĝas la portretoj de la caraj martiroj kaj iliaj biografioj. Antaŭ la portretoj estas multe da floroj kaj brulas kandeloj.

En la supra templo ni preĝis antaŭ la ikono „Trojeruĉitsa” (Trimanulo), kiu estis revenigita al la templo el eksterlando. La ikono estis en la Ipatjev-domo (sur la loko estas la templo) dum la malliberigo de la cara familio kaj la gefamilianoj preĝis al Dio antaŭ la ikono dum la teruraj tagoj.

La supra templo havas sub la kupoloj la bildon de la granda ikono de Dipatrino „Signo” („Znamenije”), Dipatrino sur la blua fono kvazaŭ ĉirkaŭprenas ĉiujn preĝantojn en la templo.

Dum la caraj tagoj, kiuj pasis en Jekaterinburgo la tutan semajnon (14a ĝis 20a de julio) ni povis viziti literaturajn kaj artajn ekspoziciojn en la aliaj muzeoj de la urbo. Sur la granda placo apud la templo estis organizita la ekspozicio „La urbo de majstroj” kun uralaj metioj kaj aplikaj artoj.

Antaŭ la templo estas grandioza monumento pri la cara familio de la skulptisto K. Grunberg.

Larisa KUZMENKO, Ruslando

Vin, ho Eternulo, mi fidas, ke mi neniam estu hontigita; per via justeco savu min. Klinu al mi Vian orelon, rapide savu min! Estu por mi forta roko, fortika kastelo, por helpi min. Ĉar Vi estas mia roko kaj mia kastelo; kaj pro Via nomo gvidu min kaj konduku min.

Psalmo 31.1-3

Mia Patro, mi preĝas por tiuj kiuj ne konas Vin kaj ankaŭ por tiuj kiuj ne kuraĝas akcepti vian pardonon kaj gracon. Amen.

Jelly KOOPMANS-SCHOTANUS



La preĝo de Manase

- 1 Sinjoro ĉiopova,
Dio de niaj patroj,
de Abraham, Izaak kaj Jakob,
kaj de ilia ĵusta idaro,
- 2 Vi kiu faris ĉielon kaj teron kun tuta ĝia ornamo,
- 3 kiu ligis la maron per la parolo de Via ordono,
Vi kiu ŝlisis la Profundegon kaj sigelis ĝin per Via timinda glora nomo;
- 4 Vi, antaŭ kiu timas kaj tremas ĉio, pro Via potencia vizaĝo,
- 5 ĉar ne eblas elteni la majeston de Via gloro
nek eblas toleri Vian minacan koleron kontraŭ la pekuloj;
- 6 sed tamen: senlima kaj ne traŝpurebla estas la kompatemo de Viaj promesoj,
- 7 ĉar Vi estas la Sinjoro, la plej alta:
pardonema, kompatema kaj gracoplena,
kaj Vi pentas pri homa sufero.
- 8 Vi do, Sinjoro, Dio de la ĵustuloj,
Vi ne devigis pentemon por la ĵustuloj,

- Por Abraham, Izaak kaj Jakob, kiuj ne pekis antaŭ Vi,
Sed min — pekulon — Vi devigis al pentemo.
- 9 Ĉar miaj pekoj estas pli nombraj ol la mara sablo:
abundas miaj malbonagoj, Sinjoro: ili abundas!
Mi ne meritas levi la rigardon kaj ŝpekti la altan ĉielon,
pro la amaso de miaj malĵustajoj.
 - 10 Kurbigite sub multaj feraj katenoj,
tiel ke mian kapon mi ne povas levi pro miaj pekoj,
mi ne havas malstreĉiĝon,
ĉar Vian koleron mi vekis
kaj malbonon mi faris antaŭ Vi,
starigante abomenindaĵojn kaj multigante indignaĵojn.
 - 11 Kaj nun mi kurbigas la genuojn de mia koro,
petegante pri Via boneco.
 - 12 Mi pekis, Sinjoro: mi pekis,
kaj mi rekonas miajn malbonagojn.
 - 13 Petege mi imploras Vin:
Pardonu min, Sinjoro: pardonu min!
Ne neniigu min kun miaj malbonagoj!
Ne gvatu miajn fiagojn kun eterna rankoro,
nek pune kondamnu min en la plejprofundon de la tero,
ĉar Vi, Sinjoro, estas la Dio de la pentemuloj.
 - 14 Sed montru en mi Vian bonecon,
kaj savu min — senmerite — laŭ Via granda kompatemo.
 - 15 Tiam mi laŭdos Vin ĉiujn tagojn de mia vivo,
ĉar la tuta forto de la ĉieloj himnas pri Vi
kaj Via estas la gloro, eterne.
- Amen.

KVAR LIBROJ EL RUSLANDO

Ruslanda eldonejo „Sezonoj” en la lastaj kvar jaroj eldonis kvar gravajn librojn de la klasika rusa literaturo. Ĉiuj libroj estas kompetente tradukitaj kaj bone presitaj (fortika bindo, kromkovrilo).

LEV TOLSTOJ. RESUREKTO / Tradukis Viktor Sapoĵnikov. — Sezonoj, 2000, 368 paĝoj, kromkovrilo. Serio „Rusa Literaturo”, volumo 6. — Prezo: 24 eŭroj.

„Resurekto” de Lev Tolstoj, eldonita en 1899, estas la lasta el la grandaj rusaj romanoj de la 19a jarcento, kaj ĝi restas unu el la plej legataj verkoj, iam ajn verkitaj en la rusa lingvo pro la kombino de la romantika intrigo kun la filozofia, morala kaj etika problemaro. La „simpla kaj terura historio de Katjuŝa Maslova” estas legebla ankaŭ en Esperanto per la traduko de Viktor Sapoĵnikov.

NIKOLAJ GOGOL. MALVIVAJ ANIMOJ / Tradukis Vladimir Vyĉegjanin. — Sezonoj, 2001, 224 paĝoj, kromkovrilo. Serio „Oriento-Okcidento”, volumo 32. — Prezo: 18 eŭroj.

„Malvivaj animoj” de Nikolaj Gogol estas unu el la plej fierindaj verkoj de la rusa literaturo. La nomoj de Ĉiĉikov kaj de aliaj protagonistoj jam delonge metaforiĝis, kaj citaĵoj el „Malvivaj animoj” estas parto de ĉiutaga vivo en Ruslando dum pli ol 150 jaroj malgraŭ tio, ke Gogol ne sukcesis finverki ĝin. Post la Zamenhofa traduko de „La Revizoro”, finfine ankaŭ „Malvivaj animoj” aperis en Esperanto — en la prestiĝa serio „Oriento-Okcidento”.

FJODOR DOSTOJEVSKIJ. BLAN-

KAJ NOKTOJ / Tradukis: Grigorij Arosev, Aleksej Birjulin, Aleksander Korĵenkov. — Sezonoj, 2002, 448 paĝoj, kromkovrilo. Serio „Rusa Literaturo”. Volumo 8. — Prezo: 30 eŭroj.

„Sezonoj” planas eldoni kvinvoluman kolekton de Fjodor Dostojevskij en Esperanto. En la unua volumo, „Blankaj noktoj”, estas ses liaj prozaĵoj. Krom la samtitola novelo, „Blankaj Noktoj”, en ĝi estas ankaŭ „Malriĉaj homoj”, „Socio”, „Honestaj ŝtelistoj”, „Misfortuna historio” kaj „Noticoj el la kelo” en novaj tradukoj.

RUSA NOVELARO. 19a JARCENTO / Tradukis Aleksander Korĵenkov kaj aliaj. — Sezonoj, 2003, 400 paĝoj, kromkovrilo. Serio „Rusa Literaturo”, volumo 9. — Prezo: 30 eŭroj.

Jen la vera kremo de la rusa literaturo — Rusa Novelaro! Grupo da tradukantoj kaj provlegantoj laboris dum kelkaj jaroj. La libro enhavas la plej bonajn rakontojn kaj novelojn de Aleksandr Puŝkin, Mihail Lermontov, Nikolaj Gogol, Ivan Turgenev, Fjodor Dostojevskij, Mihail Saltykov-Ŝĉedrin, Lev Tolstoj kaj Anton Ĉeĥov.

Ĉi tiuj libroj estas mendeblaj ĉe „Sezonoj” poŝte (RU-236039 Kaliningrad, p.k. 1248, Ruslando) aŭ rete: sezonoj@gazinter.net.

Rabatoj: 3-10 ekzempleroj 33% 11-20 ekzempleroj 40% pli ol 20 ekzempleroj 50%

La Ondo de Esperanto / Sezonoj / Balta Esperanto-Forumo Halina Gorecka / Aleksander Korĵenkov Adreso: RU-236039 Kaliningrad, p.k. 1248, Ruslando Retadreso: sezonoj@gazinter.net <http://Esperanto.Org/> Ondo Telefono: (0112) 566033

Karaj, ĝis hodiaŭ mi ricevis jenajn aliĝilojn al nia Kongreso:

1. KRONENBERGER Albrecht	DE
2. BAGI Irén	HU
3. DARVAS Zsuzsanna	HU
4. RÁCZKEVY-EÖTVÖS Ágnes	HU
5. FARKAS Eva	HU
6. ARADSON Bengt Olof	SE
7. HAMAJDOVÁ Jaroslava	CZ
8. TUINDER Jacques	NL
9. TUINDER Vera	NL
10. KRÜGER Siegfried	DE
11. LÁSLO Maria	RO
12. SOMHEGYI Zoltán	HU
13. SZEMÓK Balász	HU
14. GANSWIJK VAN Wil	NL
15. HANDLOVÁ Jarmila	CZ
16. SALANNE Simo	FI
17. KANTELE Olavi	FI
18. MAJERSKÝ Miroslav	CZ
19. ASCHEROVÁ Miroslava	CZ
20. BANATI Katalin	HU
21. TICHÝ Pavel	CZ
22. PUIJENBROECK Ruth	CH
23. STAMM Sieglinde	AT
24. REHM Britta	SE
25. POLNICKÝ Pavel	CZ
26. POLNICKÝ Tomáš	CZ
27. LEJA Kazimierz	PL
28. CZIRN-TERPITZ Helga	DE
29. STROINSKI Monika	DE
30. STROINSKI Hieronymus	DE
31. POSPÍŠIL Václav	CZ
32. POSPÍŠILOVÁ Ria	CZ
33. GAILLARD Samuel	FR
34. SCHAEFFER Karl Heinz	DE
35. UDALOVA Irina	RU
36. UDALOV Ivan	RU

37. COUSSON Philippe	FR
38. BARDOCZ Erika	HU
39. DERCKX Gerda	NL

Salutas Vin

Pavel POLNICKÝ

Estimata sinjoro Cousson,

Mi volas reagi al via raporto en Dia Regno 5/2003, paĝoj 101 kaj 102. Interalie vi skribis, ke tre malofte venas leteroj de legantoj, kiuj komentas, kritikas aŭ proponas ion por la gazeto. Tion mi nun volas fari.

Ĝenerale mi taksas Dian Regnon interesa kaj leginda. Tre interesa estas por mi konstati, ke la aŭtoroj venas el diversaj landoj aŭ kontinentoj. Mi pensas, ke tio estas granda avantaĝo de nia revuo, ke ne nur homoj el unu aŭ du landoj kontribuas, sed el multaj landoj, tradicioj kaj konfesioj. Eble krom Dia Regno ne estas multaj sam-mult-naciaj kristanaj ĵurnaloj. Do tiun avantaĝon ni flegu. Mi tial ankaŭ volas proponi, ke oni — se la aŭtoro konsentas — indikas post la artikolo ne nur la nomon, sed ankaŭ la landon de la kontribuanto. Mi ankaŭ ŝatus legi raportojn pri la kristana vivo en aliaj landoj, ekzemple, kiel vivas kristana eklezio en afrika lando? Kiel vivas kristana malplimulto en ekzemple budhisma plimulto? Kion pensas arabaj kristanoj? k.t.p. Plia propono estas diskutpaĝo „por kaj kontraŭ“. Du personoj prezentu sian (se eblas kontraŭstarantan) opinion pri iu aktuala temo aŭ la „oficialan“ (ekzemple luteranan,

baptistan...) opinion de sia konfesio. Certe malfacilas trovi „diskutantojn“ post nur mallonga tempo, sed indas provi. Pri kio diskuti? Ĝenerale eblas diskuti pri ĉio, sed ĉiam devas esti temo, kiu koncernas kristanan kredon. Mi mem havas ideojn: Kiel ni komprenas la Biblion? Ĉu ni rajtas uzi la metodojn de la moderna literatur- aŭ historiscienco por analizi la tekstojn? Ĉu ni povas diri, ke ni ĉiuj estas en la sama eklezio, kvankam ni estas en multaj diversaj kristanaj konfesioj? Kie estas la limoj? Certe tiuj temoj ne estas la temoj de aliaj legantoj, do mi proponas al ĉiuj, skribi, pri kio ili ŝatus legi ĉu diskuton, ĉu „normalan“ artikolon. Eble iu ŝatus recenzi esperantlingvan libron? Lasttempe kelkfoje aperis libroj pri nia aŭ alia kredo en Esperanto. Mi certas, ke multaj povus kontribui per proponoj aŭ propraj tekstoj. Mi mem pretas, kiel mi jam faris, skribi por Dia Regno temajn artikolojn. Nun mi jam scivolemas pri la opinioj de la aliaj legantoj.

Via

Wolfram ROHLOFF
Bad Lausick (Germanio)
la 21an de decembro 2003

P.S. Nur unu kritikpunkton mi havas: kelkfoje estis tro multaj prediketoj en la libro, ilin ni ne forgesu, sed ne estu tro multa en unu numero. Aliflanke oni povus en ĉiu numero publikigi prediketon aŭ meditan tekston pri speciala biblia versiklo, ekzemple pri tiu, kiu estis elektita por la monato aŭ jaro.

Ekzemple la versiklo por 2004 estos el la Evangelio laŭ Marko, ĉapitro 13, versiklo 31: Kristo diras: *La ĉielo kaj la tero forpasos, sed miaj vortoj ne forpasos.*

Honore al: Gerrit BERVELING

La nomo de Gerrit BERVELING el Nederlando estas konata al multaj esperantistoj kaj eĉ neesperantistoj. Antaŭ 25 jaroj aperis lia unua traduko, kaj multajn tradukojn sekvis eĉ propraj poemoj kaj prozaj verkoj.



Mi nur mencias la lastajn tradukojn: Komence de la jaro 2004 aperis traduko de verko de konata nederlanda verkisto, Simon Carmiggelt kun la titolo: „Morgaŭ denove ni vidu“. La libro enhavas faskon de rakontoj kaj historietoj.

En julio li ricevis la OSIEK-premion por la unuaj du partoj de *Antologio Latina*.

En novembro la Brita Biblia Societo reprenis la Biblion kun la traduko de la Duakanonaj Libroj fare de Gerrit: giganta laboro. Li finpretigas nun la kompletan Paŭlo-tradukon kaj la represon de volumo 1 kaj 2 de *Antologio Latina*.

En tiu ĉi jaro aperos ankaŭ la tria volumo.

Li estas lerta kaj sprita preleganto en kaj ekster la Esperanto-movado.

Kiel Remonstranta pastoro li estis ege okupita kaj antaŭ kelkaj jaroj li reiris al sia unua profesio: instruisto de la klasikaj lingvoj en gimnazio kaj eĉ de Esperanto en malgranda lerneja rondo.

La 3an de aprilo li festos la 60an datrevenon de sia naskiĝtago en amika kaj familia rondo.

Els VAN DIJK



Kvankam mi estas malnova KELI-ano, mi ne skribis al la redaktoro. Ofte mi trovis ion altvaloran, sed mia „maldiligenteco” malhelpis min skribi kaj danki vin. Pardonu!

Tamen! Mi volas danki vin pro la nova kunlaboranto en *Dia Regno* 6/2003, Pastoro Bayo AFOLARANMI (el kiu lando li venas?) Liaj artikoloj iris direkte al mia koro! Precipe „kontenteco, granda gajnilo” sur la lasta paĝo, kiu rilatas al mia kara patrino, kaj „ĉu Dio forgesas min?” kiu rilatas al mi mem! Ankaŭ pri la agloj (mi estus danka ricevi la anglan tradukon de la teksto Jesaja 40:31).

Mi ofte trovas trezorojn en *Dia Regno*, sed momente forgesas ilin. Mi sciiĝis multflanke pri la sanstato de nia ŝatata amiko pastoro Adolf BURKHARDT. Ni estas granda ĉeno kiu preĝas por li.

Vin mi ne renkontis, sed certe dependas de via juneco (?) ĉar la tempo, kiam mi kun granda feliĉo povis viziti KELI-kongresojn, estas longe for (mia unua estis en Markt-leuthen 1959 — ne forge-sebla!).

Dio benu vin!

Kun dankaj salutoj, de

Lilly WIKSTRÖM, Stockholm

Du respondoj:

1. Bayo AFOLARANMI estas niĝeriano.

2. Mi mem, kvankam juna, jam estas 50-jaraĝa, kaj mia unua KELI-kongreso estis Edinburgo, 1977.

P. C.

OLLE OLSSON



Nia kara kaj estimata KELI-membro dum multaj jaroj, Olle OLSSON, Lund, Svedio, forlasis nin 94-jaraĝa. Li estis unu el niaj nestoroj en la sveda esperantomovado. Profesie li estis instruisto. Nekalkuleblaj estis la esperantokursoj gviditaj de li kun entuziasmo kaj tre bona pedagogio.



Li estis prezidanto de la sveda KELI-sekcio 1980–1985. En multaj aliaj asocioj li estis estrarano: I.a. en ILEI por la E-instruistoj. Honora membro li estis en Sveda Esperanto-Federacio kaj UEA. Li havis tre grandan kontaktoŝancon kun esperantistoj ĉirkaŭ la mondo kaj imponas korespondadon. Libroj multe interesis lin. Dum sia aktiva tempo li verŝajne ne maltrafis eĉ unu el la esperantokongresoj en Svedio kaj eksterlande.

Li laboris multe por interpopola komprenemo kaj kunlaborado. Specialan koron li havis por UN kaj agis multe por informi pri ĝi kaj klopodis pligrandigi la apogon por tiu organizo.

Konsekvence la enteriga Diservo por Olle okazis la 24an de oktobro, kiu estas la UN-tago.

Dankon, Olle, kaj ripozu en paco. Vian bonan imitindan ekzemplon ni longe memoros kaj klopodos sekvi.

Britta REHM

OLLE OLSSON 1909–2003



Olle OLSSON, Lund, Svedio forpasis la 13an de oktobro 2003.

Li estis honora membro de UEA kaj ILEI. En KELI li dum multaj jaroj faris alte taksatan laboron.

Kiel juna studento li lernis E-on dum la 20aj jaroj, kaj poste li dum sia tuta vivo entuziasme laboris por disvastigi la konon de la Internacia Lingvo. Kiel instruisto, ĉefe en Lund, li gvidis multegajn E-kursojn por infanoj. Li plurfoje kun siaj klasoj partoprenis en la tiama projekto ‘Grajnoj en vento’. Li ankaŭ senlace laboris por la kono pri kaj la kompreno por UN.

Olle OLSSON estis ege vojaĝema kaj li preskaŭ ĉiujare partoprenis en UK-kongresoj, KELI-konferencoj kaj ILEI-konferencoj.

Dum multaj jaroj Olle Olsson apartenis al la estraro de ILEI kaj respondecis pri la financaj aferoj. En Svedio li dum pluraj jaroj estris la Svedan KELI-sekcion.

La funebra ceremonio okazis en Lund la 24an de oktobro, la tagon de UN. Dum la posta memorkunestado la subskribinto diris kelkajn vortojn en la nomo de KELI.

Bertil ANDREASSON

MARTIN HOWARD



Mi bedaŭras diri ke Martin HOWARD mortis la 21an de decembro matene. La fino estis paca. Dum du jaroj li batalis kontraŭ kancero. Dum la lastaj tagoj la kancero atingis la cerbon. Lia edzino diris al mi ke ŝi estis kun li dum la finaj horoj. Li estis sen doloro ĉar ŝi donis al li ‘codeine’. Ili parolis pri la ‘interna lumo’ kaj li malrapide kaj pace foriris. Martin dum kelkaj jaroj estis la sekretario de la ‘Kvaka Esperantista Societo’. Li ofte vizitis Pollandon, partoprenis en ‘La Ora Pola Aŭtuno’ kie li praktikis alternativan medicinon.

Eric WALKER
Ipswich, Britio

KERSTIN SJÖHLIN



En julio ĉi-jare forlasis nin la KELI-anino Kerstin SJÖHLIN, Motala, (suda Svedio). Ŝi naskiĝis 1912 en la urbo Falköping. Ŝi poste translokiĝis al Motala, kie ŝi laboris en la tekstila industrio. Ŝi komencis frue interesiĝi pri esperanto kaj estis dumviva membro de KELI. Ŝi partoprenis la unuan KELI-kongreson en Tostarp, Svedio, en la jaro 1948. Ŝi ankaŭ ĉeestis eksterlandajn esperantokongresojn.

Sed dum la lastaj jardekoj ŝi pro malforteco ne povis partopreni kongresojn. Ŝi estis membrino de la baptista eklezio de Motala.

Ŝi ripozu en paco!

Anna LANDFORS

LA CENTA PSALMO

Psalmo 100 estas unu el la plej popularaj psalmoj. Multaj homoj lernis ĝin parkere. Efektive, mi jam lernis ĝin parkere ekde la elementa lernejo. Kial la kvin-versa psalmo estas populara?

La kialo estas, ke ĝi estas psalmo de dankado. Antaŭ nelonge, mian koron instigis la beleco de ĉi tiu laŭda psalmo.

Versikloj 3 kaj 5 donas kvin kialojn. Unua kialo: ni adorservas LA Dion, la unu kaj nuran Dion. Ĉiuj aliaj dioj estas absolutaj idoloj. Ili ne povas esti komparitaj kun Li (vidu: Readmono 4:35,39; 1 Reĝoj 19:39; Psalmaro 86:8; 89:6; 95:3; 96:4-5; 97:9; Eliro 15:11; Jesaja 40:18; Jeremia 10:10-16).

Dua kialo: la Eternulo kreis nin. Antaŭ ol Li kreis nin, Li kreis ĉion, kion ni bezonas por ke manku nenio al ni (Genezo 1; Ijob 10:8-13; Psalmaro 139:13-24).

Tria kialo: al Li ni apartenas, tiel Li zorgas pri ni; Li subtenas nin; Li protektas nin; Li provizas por ni, ktp (Psalmaro 74:1-2; 78:52; 95:7; Jesaja 40:9-11; Jeĥezkel 34:11, 30-31; Johano 10:14-16, 26-28). Ni apartenas al Iu, kiu zorgas! (Psalmo 34:15; Mateo 6:26; Luko 12:30; 1 Petro 5:7).

Kvara kialo: la Eternulo estas bona kaj Li faras bonaĵojn. La Sankta Biblio

prezentas ĝin ĉimaniere: *Jesuon, Nazaretanon, kiun Dio sankoleis per Sankta Spirito kaj potenco; li ĉirkaŭiris, bonfaraŭte kaj sanigante ĉiujn premegatajn de la diablo, ĉar Dio estis kun Li* (Agoj

10:38). Ĉu Li ankoraŭ faras bonaĵojn ĝis hodiaŭ? Jes ja! Pensu pri via vivo.

Kvina kialo: la amo, favorkoreco, kaj fideleco de Dio estas daŭraj (Eliro 34:6-7; Readmono 7:9; Psalmaro 36:5; 103:17; 119:90-91; Plorkanto 3:22-23; Luko 1:50).

La supraj kialoj igis la psalmiston ĝoji kaj konsili nin ĉiam adori Dion kun dankado kaj laŭdado en versiklo 4.

Tamen, kial ni devas adori, glori kaj beni Lin dum ni ne ricevas respondon al niaj preĝoj? La centa psalmo konsilas nin simple servi Dion pro Tiu, kiu Li estas, kaj kion Li faras por ni, ne pro tio, kion ni akiras de Li. Li estas pli ol tio,

kion ni bezonas. Tiuj, kiuj ĝojas en sia neplaĉa situacio, estas konvinkitaj de la amo de Dio, kiu neniam forlasas iun ajn kiu kredas je Li. Nutru vian animon per la centa psalmo kaj vi vidos ke Dio ja estas bona!

Je la servo de Dio,

pastoro Bayo AFOLARANMI

Ĝoje kriiu al la Eternulo la tuta tero! Servu al la Eternulo kun ĝojo, venu antaŭ Lian vizaĝon kun kanto. Sciu, ke la Eternulo estas Dio; Li nin kreis, kaj al Li ni apartenas, Lia popolo kaj ŝafoj de Lia paŝteco. Eniru en Liajn pordegojn kun dankado, en Liajn kortojn kun laŭdado. Gloru Lin, benu Lian nomon; ĉar la Eternulo estas bona; Lia favorkoreco estas eterna, kaj de generacio al generacio daŭras Lia fideleco.

(Psalmo 100)